# Pli kaj pli da krudmaterialoj por historiaj esploroj, kaj ...


Esperantologia Konferenco
la 100-a UK, Lillo, Francio
2015-07-30

GOTOO Hitosi

# enkonduke

Esperanto-Japana Vortaro


2006, JEI




Premio Ossaka 2006

# enkonduke

Shibata Iwao kaj Gotoo Hitosi (red),
*Biografia Leksikono de la*
*Esperanto-Movado en Japanio*
Hituzi-syobô, 2013




Ampleksa verko traktanta ĉ. 2900
iamajn japanajn esperantistojn

Premio Ossaka 2014
Diplomo pro Elstara Agado 2014

# samtempaj dokumentoj kiel krudmaterialoj

diversspecaj, sed unuavice gazetoj:

*La Japana Esperantisto* (JEA) 1906-1919

*La Revuo Orienta* (JEI) 1920-

- la plejparto (jarkolektoj post 1923) estis, feliĉe por mi, facile alirebla (sed por multaj ne).

# 20-a jarcento: Represoj de gazetoj

*Literatura Mondo* 1922-1949

Tokio: Kooperativo por Represo de Literatura Mondo, 1969 – 1976

*Tempo* 1934-1940

Nagojo: Nagoja Esperanto-Centro 1982

*La Esperantisto* 1889-1895

Hildesheim: Olms, 1988 (R. Haupenthal)

# ludovikito (itô kanzi)

*plena verkaro de zamenhof*



respresoj de:

*Lingvo Internacia* 1895-1902

*L'Espérantiste* 1898-1902

# 21-a jarcento
# surretigo de malnovaj dokumentoj

En Japanio:

Nacia Parlamenta Biblioteko

Nacia Arkivo

aliaj bibliotekoj, universitatoj, ĵurnalejoj, ktp.

inkluzive de esperantaĵoj

ankaŭ alilande, sed malfacilas akiri koncernajn informojn, kaj malhelpas foje lingvaj baroj.

# surretigo de malnovaj dokumentoj en Esperantio

Aŭstria nacia biblioteko

**http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm**

Bitoteko - gazetoteko

**http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7**

*Scienca Revuo*

**https://scienca-revuo.info/issue/archive**

# Mondvojaĝantoj en la unua duono de la 20-a jc.

Bohumil Pospíšil 1902? - ?

ĉeĥa ĵurnalisto, 1928/1929 en Japanio

Joseph R. Scherer 1901 – 1967

svisa-usona bankofcisto-preleganto, 1930 en Japanio

Lucien P**é**raire 1906 - 1997

franca laboristo-biciklisto, 1930 en Japanio

Gaspard Marin 1883 - 1969

belga-brita anarkiisto-etnologo, 1935-1936 en Japanio

# Edmund Zscheile

Lejpzig-devena poeto-aktoro, survoje de planata 7-jara pieda mondvojaĝo ekde 1923, en akompano de Wilhelm Pelz

1926-09-25 alveno al Nagasaki

kunsidoj kun lokaj esperantistoj en Nagasaki, Kurume, Hukuoka, Kobe, Osaka, Kameoka, Mie, Nagoya, Jokohamo, Tokio


en decembro  forveturo al Tajvano

*La Revuo Orienta* 1926.11-1927.1

# Edmund Zscheile (en Japanio)

Bonveniga kunsido por Zscheile en Hukuoka, 1926-10-07

(RO 1926.11)



〔寫眞說明〕 世界徒步一周二青年をむかへて福岡エス會の歡迎會。向つて右より。前列。江口、藤澤(教授)、星子、ペルツ、チヤイレ藤井、伊藤(助教授)。中列。勇、橋本、笹木、宗像、大島(教授)、田中、山崎(教授)、村上、後列。大前、尾崎、城戸崎、菊地の諸氏

# Edmund Zscheile (en Japanio!)

## Aŭstria Nacia Biblioteko

**http://data.onb.ac.at/rec/baa5347329**

Leipziger Esperantisten zu Besuch in Japan, Kurume 1926
Gruppenfoto: Edmund Zscheile und Wilhelm Pelz mit den Japanern Kidozaki, Ha-ja-mi und Fukujiro Isamu anlässlich ihres Besuchs in Kurume-shi ;1926



# Edmund Zscheile (en Germanio)

## Aŭstria Nacia Biblioteko

**http://data.onb.ac.at/rec/AC07793683**

Zu Fuß und Schiff ums Erdenrund : kurzer Bericht meiner siebenjährigen Weltwanderung 1923-1930 ; Radiovortrag gehalten im mitteldeutschen Rundfunk Leipzig

Zscheile, Edmund

Leipzig ;[1937]

# Edmund Zscheile (en Ĉinio)

`http://www.espero.com.cn/old/epch/05e/05e-03k/esperantujo3-10e.htm`

**Lusin kaj Esperanto**

En kunveno de esperantistoj en Kantono de HOU ZHIPING

Meze de januaro 1927, Lusin venis al Kantono kaj laboris kiel dekano de la literatura fakultato de Zhongshan-universitato. Tiam en Kantono la Esperanta movado estis pli vigla ol tiu en Pekino kaj pli ol 20 lernejoj instruis Esperanton. ... Ghuste tiam oni preparis kunvenon por bonvenigi Zeihile, germanan esperantiston kaj poeton piedvojaghantan tra la mondo. Li ekiris de Germanio en la 1-a de augusto 1923 kaj travojaghis jam 27 landojn. Post tri kaj duona jaroj li venis al Kantono.

En la kunveno Lusin faris paroladon subtenantan Esperanton. El tio oni povas vidi lian altan takson al Esperanto.

# Edmund Zscheile (en Aŭstralio)

*La suda kruco* 1928.04.10

SYDNEY, N.S.W. -- ... S-ro Edmund Zscheile, atingis Sydney ĝustatempe por partopreni la kunvenon je 1a. de Marto. ..., s-ro Zcheile en dekminuta parolado informis membrojn pri la kialoj de lia vojaĝo kiu jam daŭris preskaŭ 5 jarojn kaj montris kiel aŭtentikaĵo librojn kun subskriboj, sigeloj kaj stampiloj zorge ordigitaj laŭ landoj, el ĉiuj terpartoj escepte Ameriko, kiun li nun alvojaĝas. Li kreis bonan, fidindan impreson.

Ĵaŭdon, la 15a., ... Je la dua parto, s-ro Zcheile, ..., daŭrigis sian rakonton ... kaj interese skizis okazintaĵojn spertitajn en Rusujo, Manĉurio, Ĉinujo, Japanujo, Formoso, Filipinoj, Siamo, Hindujo kaj Cejlono, de kie li iris al Aŭstralio. -- Sydneyanoj gajnis tre favoran opinion pri tiu migrulo pro sia kvieta, neenŝovema maniero kaj deziras ĉiun bonon al li. La 23an de Marto li forvojaĝis per “Marama” al Auckland, Nov-Zelando, survoje al Fiĝi, Samoo kaj San Francisko. ...

# Edmund Zscheile (en Japanio!)

*The Australian Esperantist* 1981, aprilo-majo

**LA MALKURAĜULO**

Dum mia migrado ĉirkaŭ la mondo mi atingis iutage la japanan porcelan-urbon Arita, kaj vizitis la solan esperantiston, D-ro K, kies adreson mi jam delonge posedis.

"Ĉu mi havas la honoron saluti sinjoron K.", mi demandis, atinginte la malfacile troveblan domon. "Jes", respondis la domestro. "Ho, mi tre ĝojas renkonti ankaŭ ĉi tie esperantiston" Mi donis la manon al li. "Jes", li respondis kaj premis forte la manon. "Ĉu vi estas la sola esperantisto aŭ ĉu ekzistas Esperanto-grupo en Arita?", mi demandis. "Jes". li respondis. "Mi supozis, ke ne ekzistas hotelo en via urbeto Ĉu vi povas noktigi min en via domo?" "Jes" estis la respondo. "Ĉu vi komprenas min bone aŭ ne?" "Jes", li respondis. "Ĉu vi povas havigi iom da manĝaĵo por mi?" "Jes". estis la respondo. kaj ĉiam nur "jes" kaj "jes". Mi povis demandi kion mi volis, li ĉiam respondis per "jes". Fine la doktoro alvokis angleparolantan instruiston. Ankaŭ li respondis al ĉiuj demandoj nur per "jes".

Finfine mi mem preparis mian vespermanĝon, aranĝis liton kaj tranoktis en la domo de la doktoro. Dum la nokto mi aŭdis pezajn paŝojn super mi kaj longdaŭran murmuradon. Malgraŭ tio mi ekdormis kaj sonĝis tiel bone kiel eble.


La sekvantan tagon la doktoro salutis min, tenante skribitan alparoladon en la mano. Legante li komencis: "Kara kaj estimata samideano! Hieraŭ vespere mi estis tre malĝentila, kaj mi treege petas vian pardonon, ĉar mi neniam ekzercis paroli Esperanton. Mi estas —, mi estas, bonvolu legi mem!" Kaj rapide li transdonis al mi la paperon, sur kiun li skribis dumnokte, kaj mi miris pri la bonstilaj kaj rimarkindaj esprimoj. Per tio mi nun vidis, ke mia kurioza gastiganto povas sin esprimi tre bone per Esperanto. Li eĉ verkis konatan Esperanto-libron, tamen li ne kuraĝis paroli. Poste mi interparolis kun li kiel infano kaj depost kelkaj horoj li parolis tiel bone kaj flue, ke mi preskaŭ ne povis sekvi lin.

—Mondvojaĝinto Edmund Zscheile.

# Edmund Zscheile (en Aŭstralio)

Nacia Biblioteko de Aŭstralio, dank' al S-ro Terry Manley

**http://trove.nla.gov.au/**



# Konklude

Pli kaj pli da krudmaterialoj por historiaj esploroj, rete alireblaj

Pli kaj pli da eblecoj (ankaŭ por studoj pri lingva evoluado)

sed:

malfacilas akiri koncernajn informojn

malhelpas foje lingvaj baroj

serĉado ne ĉiam facila (pdf-dosieroj ofte simple bildoj!)

# Pli kaj pli da krudmaterialoj por historiaj esploroj

**Koran dankon**

**pro via afabla aŭskultado**